Mi persone konsilas ambaŭ metodojn kunigitajn. La unuajn tri, kvar lecionojn oni donu entute laŭ la Ĉe-metodo: laŭ plej amuza maniero — pri tio zorgu la kursgvidanto —, la lernantaro konatigis kun jenaj reguloj gramatikaj: o - a - as - j - n, kaj kun la personaj pronomoj, por ebligi konjugaciojn. La vortrezoro de ĉi tiuj lecionoj ne estu tro vasta, ĉar la atento iru speciale al la koncerna regulo gramatika kaj ne dronu en vortabundo. La lernantaro estas kaptita, kaj vi instruas plu... Ĉiu sekva leciono havu du partojn: en la unua, vi instruas la novan materialon laŭ la Ĉe-metodo; en la dua, la kursanoj jam tute fiere uzas E-libron. Laŭtvoĉe ili ekstervice legas parton de la teksto, kiu enhavas la ĵus lernitajn vortojn. Ankaŭ buŝe ili respondas de vi metitajn demandojn kaj ricevas aliajn kiel hejmtaskon. La belsonan elparolon vi nepre postulu. Kiel eble plej baldaŭ la lernantoj sin esprimu esperantlingve.

##### c) La kursgvidanto.

Estas senkonteste konsilinde elekti profesion instruiston kiel kursgvidanton. Li estu pli malpli perfekta esperantisto kaj lerte manipulu la de li elektitan metodon.

Kelkaj asertas ke eksterlanda instruisto estas preferinda: ja, « neniŭ estas profeto en sia landeto », kaj io nova ĉiam logas. Sed por la laŭ-libra metodo, tutfremda instruisto ne taŭgas, escepte de samlingvano. Por la Ĉe-metodo la nacieco ne gravas. Sed denove la opinio malsamas: unuj trovas preferinda ke la kursgvidanto ne konas la gepatran lingvon de siaj kursanoj, por ke ĉi tiuj

dekompence ne kutimu al interparoladoj en la gepatra kaj tiel neglektu la provadon en la esperanta. Tiu manko de komuna lingvo ankaŭ malhelpas ke trudigemaj elementoj maloportunas la instruiston. Nu, pravaj argumentoj. Tamen, mi opinias ke samlingva kursgvidanto havigas pliajn avantaĝojn, ĉi foje el la lernanta vidpunkto: dum la paŭzoj li povas aparte klarigi malfacilaĵojn gramatikajn al malpli kapabla bonvolulo; li povas iom post iom inici la novulojn en la homaman spiriton, kiun entenas E., paroli pri Zamenhof, pri la historio de E., pri mondlingvo generale, pri ĝia alta celo, ktp. Kaj ĉu ankaŭ tio ne gravas? Se la instruisto scias respektigi la etiketan distancon, se li ne konsentas superfluan interbabiladon en la gepatra, li ne devos timi troan familiarecon, nek fiaskon de la kursoĉelo.

#### La progresiva kurso.

Tuj post la elementa kurso, aŭ post mallonga interrompo, okazu progresiva.

##### a) Daŭro.

La daŭron de ĉi tiu oni ne povas fiksi, ĉar ĝi fakte neniam devas finiĝi. Se oni konsideras nur la kurson, samkiel la elementan, ĝi ne povas esti tro longdaŭra. Se ĝi okazas en la kadro de la grupkunvenoj, tiam ĝi vere estas senfina.

##### b) Metodo.

Ĉi tie la laŭ-libra metodo estas nepre konsilinda. La progresiva kurso ĉiam komenciĝu per ripetado de la gramatikaj renkontitaj en la elementa kurso. Se ĉi-lasta okazis laŭ la rekta metodo, vi nun elektu ekz. la lernolibrojn de Szilagy. Se vi uzis la unuan parton en la komenca kurso, vi prenu nun la duan, aŭ ekz. « La Verda'n Koro'n » de Baghy. Tre taŭga ĝi estas, ĉar en romanforma verko, la aŭtoro pritraktas, unu post alia, ĉiujn gramatikajn regulojn, kaj ĝi ebligas multflankan ekzercadon.

##### c) La kursgvidanto.

Ĉi tie li estu nepre samlingvano kaj plejofte estas samgrupano, kiu jam antaŭe lingve perfektigis. Kiel por la komenca kurso, li estu prefere profesia instruisto kaj li ĉiam sciu konservi iagradan aŭtoritaton.

(daŭrigota)

## ESPERANTO-DICHTERS in vertaling

Veertig jaren geleden trad de talentvolle Fransman Lucien Thèvenin (geb. 1891) in de rangen van de Esperantisten en af en toe klonk zijn stem helder op in een reeks gedichten, die nu gebundeld het licht zagen onder de titel « Het Nutteloze Lied ».

### HET NUTTELOZE LIED

De vink in de ijs'ren kooi gevangen  
Zingt dapper als in 't open veld,  
Doch nutloos noden zijn gezangen  
Waar het een vrije vogel geldt.

Zo zal hij hoopvol lied'ren heffen  
En nooit verflauwen 't leven lang,  
Maar zal 't waarom toch nooit beseffen  
Van de eigen nutteloze zang.

Zijn lied nochtans in schoonheid huivert  
En zwerft de lucht in wonder fris,  
Naar 't firmament dat blauw gezuiverd  
En naar het woud waar 't donker is.

De dichter in ivoren toren  
Zingt als de vogel onverstoord  
Tot de Natuur, in stilt verloren,  
De hemel die verwonderd hoort.

Plots stijgt hem uit het vurig harte  
Een eindeloze droeve klacht,  
Maar of hij zingt van vreugde of smarte,  
Hij nuttelos op weerklank wacht.

Zijn lied nochtans in schoonheid huivert  
En zwerft de lucht in wonder fris,  
Naar 't firmament dat blauw gezuiverd  
En naar het woud waar 't donker is.

Uit « La Vana Kanto » (1947)

H. Vermuyten.

## PATRINO

ĉina fabelo

verkis: Frans Carolina RIDWIT  
el la flandra: Dirk

Antaŭ jaroj, tiom da jaroj ke ja neniŭ scias la gustan jarcenton, la imperiestro Tsina regis nemezureblan regnon, nomitan laŭ li: Ĉinujo.

La historiistoj scias nur ke, sub lia regado, ekis la konstruado de la fabela muro, kiu ŝirmis la riĉan landon kontraŭ la raboj de la tartaraj gentoj nordaj. La maloftaj epopeoj kaj praaj popolkantoj honore kantas la gloran nomon de Tsina.

Tamen neniŭ epopeo, neniŭ kanto, krom baladeto de la nacia poeto Tu-Fu, aludas la mirindan rakonton pri Tsinatse, unika infano de la granda imperiestro. La infano estis knabino kaj ŝi portis la viran nomon Tsinatse, kio signifas: filo de Tsina. Multon la maljuna reganto oferis kaj ofte li volvis sin en pentorobon el kruda urtika ŝtofo por favori la diojn. Sed mutaj kaj blindaj restis la dioj, eĉ kiam li detranĉis siajn unue longajn ungojn aŭ glave dehakis sian longan harplekton, ĉar filon ili ne donis al li. Li fine vokis al si ĉiujn aŭguristojn kaj pontifikojn kaj petis ilian saĝan konsilon. Sed la klera kunsido ne scus konsilon.

Tiam maljunega kampulo tibeta venis ĉe la imperiestro kaj longe parolis kun li. De tiam oni nomis la princineton Tsinatse, kio signifas: filo de Tsina, kaj ĉiuj korteganoj forĝesis ke ŝi estas knabino. De kiuj ne povis forĝesi, oni elkapiĝis la cerbon kaj jetis ĝin al la hundoj.

Sed tiel belis la princineto ke Tsina mem ade memoris kiu estas Tsinatse. Sed ĉinaj hundoj ne ŝatas imperiestran cerbon kaj do, la imperiestro devis, vole nevole, suferi la turmenton de knabina vizaĝo, flava kiel la koloro de senŝelaj migdaloj, kaj de okuloj, enigme malhelaj kiel la someraj noktoj en la Gobi-dezerto. Krome Tsina ankoraŭ dufoje provis plenumi harakiri-on, sed dufoje lia glavo rompiĝis sur la dika maskuroso, kien li ĉiujfoje forĝesis depreni. Tiel vidante ke la dioj ne volas lan morton, li humile submetiĝis al ilia supera ordono kaj vivis plu.

Tsinatse estis nek ordinara knabo, nek ordinara knabino, kiaj ĉiuj geprincoj. Ankoraŭ etaj, tiel ke ili tute malaperis en sia ploranta buŝo, ŝiaj manetoj jam knedis la vakson kapricaj figuroj. Kaj kiam ili ne plu penetris sian buŝeton, ili modlis la argilon fantaziaj bildoj homaj kaj bestaj, kiuj estis lokitaj sur la altarojn de la temploj kiel dioj.

Sed kiam la manoj de Tsinatse tiom grandis ke ili kovris sian tutan vizaĝon, ŝi sopiris la povon de la dioj, kiujn ŝi kreis. Tsinatse volis viviĝi siajn budojn. En ŝiaj nigraj okuloj ekbrulis la febrosaj kaj ŝiaj molaĵaj trajtoj fiksigis de profunda sopiro. Tri tagojn kaj tri noktojn ŝi kuŝadis sur sia lito — tiam ŝi ekvojis al la sudo de la granda regno. Sekvis ŝin nek palankenistoj, nek servistinoj, nek korteganoj.

Piede de giganta montaro, la Himalajoj, ŝi trovis forlasitan kabanon kaj eklogis en ĝi. Dekfoje la nova luno glitis inter suno kaj tero, kaj same tiom da bildoj Tsinatse hakis el la montara ŝtono. La laborado senkarnigis ŝiajn manojn, la alvokado de la montospirito paralizis ŝian langon, la febro senfortigis ŝian korpon, sed vivo nenia animis unu el ŝiaj bildoj.

Ankoraŭ antaŭ la malkresko de la deka luno, ŝafisto stumbis en la kabanon. Li nomigis Wusang kaj petis pannon. Tsinatse donis ĝin kaj ŝiaj senkarnaj manoj tremis. Profunda dormo falis sur Wusang, lacan kaj satan. Longe Tsinatse rigardis la dormanton kaj tra ŝia korpo vibris energio tiel stranga ke ŝi denove sentis sin forta kaj feliĉa. Tutan nokton ŝi hakis ŝtonopecon kaj, vekigante, Wusang trovis antaŭ si la propran bildon. Vane li serĉis Tsinatse en la kabanon; en profunda kavo de la Himalajoj li malkovris ŝin, patose peteganta la diojn ke ili verŝu sian vivon en la novan bildon.

Wusang, kiu estis saĝa viro, konis la imponan sekreton de la dioj kaj tuŝite flustris ĝin en sian orekonkon. Tre dankema, Tsinatse kisis la ŝafiston.

Gojoplena, Tsinatse reiris al la patra palaco kaj, kaŝante sin de ĉiu okulo homa, ŝi prilaboris la dian majstron en sia korpo. Kiam ŝi finis, la dioj prenis sian vivon kaj donis ĝin al ŝia bildo.

Publike la imperiestro Tsina insultis kaj detruis la senvivaĵajn bildojn de la templodioj, kiuj ne donis filon al li. En lia granda lundo estis de tiam adorata nur unu diaĵo: Tsinatse, la krea virino, multe pli potenca ol ĉiuj dioj, ĉar al li nepon donis ŝi.



## Plaatselijk Nieuws

**V.E.B. Afdeling Antwerpen:** Regelmattig vergaderingen 's Maandags, met zangprogramma, afwisselend met grammaticale en andere voordrachten. Op 19.5 sprak S-ano Vermuyten wetenschappelijk en humoristisch over «La Pulo»; op 28 Juli sloot Dr. Van Gindertaelen af met een verslag over de E.dag te Bergen-op-Zoom, die op 27.7. plaats vond en bijgewoond werd door enkele V.E.B.-leden. Op Zondag 13.7: een gezellige «instuif» bij Mw De Backer op Ste-Anna-Plage. Op 14.7: letervespero — meer dan 120 inzendingen uit alle werelddelen kwamen toe en werden over de leden verdeeld. In September wordt een nieuw programma uitgewerkt en een cursus gepland.

**V.E.B. Afdeling Brugge:** Gedurende de Juli-maand, verlofmaand, verleenden talrijke leden onzer afdeling, voor kortere of langere tijd, logies aan hun buitenlandse correspondenten nl. uit Tsjecho-Slowakije, Denemarken, Nederland en Zweden. Vanzelfsprekend namen deze buitenlandse Esperantisten aan ons groepsleven deel. Er werd ook met een privaat-cursus van wal gestoken.

**V.E.B. Afdeling Gent:** Op 6 Juli jl. werd een boottocht op de Leie ingericht. Talrijke deelnemers, die er prat op gingen dat op de boot de E.vlag wapperde, zodat het een propagandatocht werd door het Vlaamse land. Hoopvol wordt in September met een cursus aangevangen om onze afdeling te versterken.

**V.E.B. Afdeling Brussel:** Op Donderdag 18 September hervat de afdeling hare bedrijvigheid. Om 20 u. zal dhr E. Cortvriendt verslag uitbrengen over het Universeel Esperanto-Congres dat te Bern gehouden werd. De vergadering gaat door zoals gewoonlijk in de Vlaamse Club, E. Jacquainlaan, 121. — Breng belangstellenden mee!

## Niaj Esperanto-Enigmoj kun premioj

**PREMIO:** post la 25-a enigmo, la premio estis aljuĝita al s-ano A. Pintelon, el Blankenberge. Li ricevis: «Tijpo kaj Aspektoj de Brazilo» — ilustrita. Gratulojn.

## SOLVO DE LA 26-a ENIGMO.

**HORIZONTALA.** 1. dolĉa; triki. — 2. mar. — 3. nenia; avara. — 4. rim. 5. ovala; omaro. — 7. palpebrum. — 8. do. — 9. ŝtip; paŝl. — 10. ke. — 11. Kalocsay.

**VERTIKALA.** 1. dento; dika. — 2. vipo. — 3. landa. — 4. lul; tra. — 5. amara; pri. — 6. ge; re; pro. 7. tramo; bo. — 8. mur; pes. — 9. itala; U.E.A. — 10. rem. — 11. ilaro; vir.

## N-ro 27: EL TRI FARU UNU!

Elektu unu silabon el ĉiu vorto de trio por konstrui novan trisilaban, sep-literan vorton. Ekz.: el «dra-go-no»; mal-a-kra; dik-ta-jo» povas fariĝi: «kra-ta-go».

**V.E.B. Afdeling Oostende:** In samenwerking met het Vlaamse Esperanto-Instituut werd door de plaatselijke afdeling een bezienswaardige Esperantostand ingericht op de internationale Jaarbeurs van Oostende. Tijdens het drukke Zomerselzoen werd alzo een uitstekende propaganda gevoerd voor Esperanto en de Vlaamse Esperantisten-Bond. De aandacht van tienduizenden bezoekers werd op onze zaak gevestigd.

**V.E.B. Afdeling Mechelen:** Tijdens de verlofperiode is de E-bedrijvigheid nagenoeg volledig geschorst, doch een actie-programma voor het aanstaande seizoen wordt voorbereid, waaronder inz. de propaganda en de inrichting van een

La kvaraj literoj de la trovitaj vortoj formas proverbon.

1. viktimo, traduki, rakonti. — 2. sukceso, pulvoro, impliki. — 3. metalo, profiti, brasiko. — 4. postuli, oblikva, ventoli. — 5. turkiso, Afriko, Francujo. — 6. vermo, obstina, konsili. — 7. romano, stomako, procedi. — 8. tranĉilo, morgaŭo, ĉeesti. — 9. fripono, budĝeto, rimarki. — 10. kandelo, vinjeto, skeleto. 11. tajloro, rubando, serpento. — 12. tumulto, spirito, kolbaso. — 13. ŝanceli, prediki, kvieti. — 14. signifi, termino, almenaŭ. — 15. tekniko, publiko, klimato. — 16. soldato, manovro, vulkano. 17. tritiko, sukcesi, persono. — 18. ponnardo, morbito, largeco. — 19. difekti, terpomo, kloako. — 20. talento, subtila, siringo. — 21. semajno, portero, postuli. — 22. rezigni, kukurbo, ciklopo. — 23. kontoro, testudo, staturato. — 24. pargeto, skarabo, konsumi.

La solvon oni sendu sur aparta folio al POSTBUS 342, BRUSSEL antaŭ la 20-a de septembro 1947.

cursus in het kader van de stedelijke avondleergangen.

## Valonujo

La 15-an de junio fondiĝis en Charleroi (Valonujo) la «Regiona Esperantista Grupo de Charleroi», kiun prezidas nia S-ano Marc Delforge, civila inĝeniero. La grupo kunvenas ĉiunmonate kaj komencos Esperanto-kurson en septembro. La korespondajn rilate la grupon adresu al la sekretario: François Charles, rue A. Bocquet 155, Farciennes.

## ĈAPITRO 26-a

«Mi kredas, sinjoroj», Kant ekigis kiam ili eksidis, «ke ekspliko ja necesas». Li bruligis la cigaron, kiun Hans Joost prezentis. «Oni: erĉu la fonton de la dramo en la pasinteco. Antaŭ pli ol kvardek jaroj, Maxton renkontis en Usono enmigrintan polan judon, Herman Steinmann, kun kiu li formis specon de komerca societo. La entrepreno ne estis leĝe registrita, kio cetere sufiĉe oftas en malgrandaj negocoj. La firma jam prosperis kiam Steinmann profitis la ŝancon kaj fuĝis kun la kaso. La klientoj versajne reestis sian monon, eble la librotendado ne tute legkonformis, ĉiukaze estas fakto ke oni respondigis Maxton, en kies nomo la negoco estis enskribita. Li ricevis dujaran karceropunon. Ĉar lia tuta havaĵo estis juĝe prenita por iom pagi la kreditorojn, lia edzino postrestis sen vivrimedoj. En tiaj malĝojaj cirkonstancoj, ŝi naskis infanon, sed ŝi mem subtralis al la mizero kaj ĉagreno.

Post sia puno, Maxton trovis nur senpatrinan infanon, en malamika mondo, kiu fingre montris lin kiel ekskapiton. Ni sole povas konjekti kio tiam fariĝis en Maxton.

Pri la unuaj sekvaj jaroj ni scias malmulton, eĉ nenion. Tamen poste Maxton elmergigis en Eŭropo, meze de la ĝuste ekfloritaj kaŭĉukospekuloj. Lia eksterordinara sagaco, kies komplikaj kombinoj liveris al li la venkon en fabelaj borsbataloj, bazis en mallonga tempo lian senmezuran riĉon, kiun li ĝis antaŭ kelkaj jaroj ade pliigis.

Kiam li ree ekprosperis, la venonta grafino de la Fosse ekkonis Elly, la filinon de Maxton. Ankaŭ Elly ne estis bonsanca por li. Post longa malsano ŝi, proksimume tridekjara, renkontis Jean Dubois, kiu elmigris kun ŝi al Sud-Ameriko tute kontraŭ la volo de Maxton. Tie ŝi mortis en tre tragikaj cirkonstancoj, ne repaciĝinte kun sia patro. Tiu ĉi tiam pentis sian tro senkompatan konduton kaj pardonis al Dubois. Sed malnova vengemo estis spronita.

Li eksciis ke Steinmann uzis la ŝtelitan monon por siavice riĉiĝi. Li decidis puni la viron, kiun li respondigis pri sia tuta malfeliĉa vivo. Ĉar ankaŭ la malfortan sanon de Elly li versajne imputis al la mizero, kiu pereigis la patrinon. Plej ruze, en ĉiuj borsoj, helpe de ĉiuj perantoj, li manovris — Dio scias kiom — por akiri la plimulton de la akcioj de la «Iron and Steel Corporation», kies precipa akciulo estis Steinmann.

Sentante la malamikon en siaj manoj, li divenigis sian vengoplanon. Steinmann tuj veturis al Eŭropo movi Maxton al la rezigno de lia plano. Tamen ĉio supozigas ke tiu ĉi mem ne sciis kiom kadukaj estis la financoj de la industriisto. Ĉiukaze, bazo de kontrakto estis difinita aŭ, pli ĝuste, trudita. La paperoj, trovitaj en la sefo, akre prilumas la proponitajn kondiĉojn. Interŝange de sava kvanto da Iscos-akcioj,

## JAĤTO VETURAS EL...

«KRIMINALA ROMANO»

Verkis: Deck Dorval.

Tradukis: Dro T. Ken.

Steinmann atestus en legitimita deklaro ke reale kulpis li pri la iama fraŭdo. Maxton kaprice deziris ke la traktado estu finita okaze de ĉi tiu piezurvojaĝo. Tial ankaŭ Notario Van der Meersch devis akompani.

Maxton ludis per sia malamiko kiel kato per muso. Steinmann tiamaniere estis enfermita en terura dilemo: kompieta ruĉo aŭ trompo-kaj ŝtelokonfeso, kiun Maxton certe publikus! Ni senpene imagas kiel Steinmann senkonsiligis kiam, en la antaŭhieraŭ nokto, li estis invitita tranci la nodon, ĉar Maxton rifuzis pluan prokraston.

Steinmann decidis murti Maxton. Malesperajo, kies danĝerojn li certe estus perceptinta en normalaj cirkonstancoj! Sed li ne sciis kiel elturniĝi. En lasta disputo kun Maxton, li mortpafis sian viktimon. En ĝian manon li sovis butonon, kiun li tiucele kunportis por suspektigi Jean Dubois.

Tiam li fuĝis al sia kajuto. Sed, intertempe, lia filo plenumis sian ebriaron kaj sinjorino Steinmann, malsage provante sirmi sian edzon, prezentis stultan alibon al ni. Versajne aŭdinte ke Dubois konas la murdinton, Steinmann deduktis ke Maxton komunikis ion al li pri siaj ĉantaĝopanoj. Li decidis definitive sientigi lin. Ni konas la uzitan procedon. Li kalkulis kun la evidenta solvo ke ĉiu opinio ke, murtinte Maxton, la komponisto memmortigis sin.

Sed nepardonable malsage Steinmann konservis botelon kun strikino en sia kofro. Mallertego! Sed, se oni ĉion konsideras, la tuta murdo estas malsagego! Steinmann vere devis konscii ke ni neeviteble trovos en la paperoj de Maxton spuron, kiu orientas al vi. Pli ol foje ĉiuj flankajoj erarigis nin. Krome, tiom malmultis la indikoj. Nur la butono rivelis al ni ke Dubois ne murtis. Cetere, ni plene palpis en la mallumo. Restis al ni nur banala kuglingo kiel sola pruvo de la murdo...

Doktoro Gulopez, kiu atente aŭskultis la tutan disvolvon, subite rektigis el sia fotelo, kvazaŭ volante interrompi la Inspektoron. Liaj okuloj brilis.

Kant jetis sian cigarstumpo en la cindruĵeton kaj vidis ke Yvonne entuziasme rigardas lin. Li ĝentile reriditis.

«Mi finis», li memkonscie konkludis, «ĉu rimarkigoj, Doktoro Gulopez?»

«Mi grandtrajto akordas kun via disvolvo, Inspektoro, escepte...»

«Escepte kion?» Kant riditis.

«Escepte ke Steinmann ne estis la aŭtoro. Li senkulpis la krimojn.»

Malrapide sed memerte li parolis. Yvonne eligis krieton. Profesoro De Groot palpebrumis kaj apertegis la buŝon, dum la tuta peza Kapitano Joost starigis.

«Kion vi celas», li raŭke grumbilis, «sed kiu... kiu do estas la murdanto?» La ŝakmajstro reve staris, kun la manoj en la poŝoj, kapo iel oblikva. Kiam li parolis, lia voko estis milda, sed kategoria. Kant jam sufiĉe konis lin kaj sciis ke li certas kion li deklaras: «La murdanto estis Maxton!...»

## ĈAPITRO 27-a

Kvaronhoron poste ĉiuj ree kunigis, sed ĉi-foje en la vasta kajuto kie, antaŭ du tagoj, Maxton trovis la morto.

Post sia drama deklaro, Doktoro Gulopez evitis ĉiun eksplikon, invitante la ĉeestantojn aliri ĉi tiun ĉambro. Sed li deziris prepari ion kaj alian kaj petis la privileĝojn al Kant, kion ĉi tiu volonte konsentis.

Tie ili nun sidis en granda rondo: Kapitano Hans Joost, plene skeptika, Profesoro De Groot, afable interesata, Kant, rezerve scivola, Yvonne kun sia nazeto supren.

Ĉar ŝi ĉeestis, Doktoro Gulopez sternis tapiŝeton el la dormĉambro sur la sekigintan sangomakulon. La diversaj privileĝoj kuŝis sur la skribotablo de Maxton.

«Mi konsideris la kazon laŭ mia sistemo, tio estas el la vidpunkto de ŝakludanto», ekigis Doktoro Gulopez. «En ŝakludo oni pristudas ĉiun eblan puŝon kaj ĉiun kombinojn, kiu povas rezulti el ĝi. En nia kazo, estis dek tri ebloj, dek tri suspektablaj personoj. Mi neglektis nur sinjoron Kant, la ŝipanaron kaj min mem.»

Helpe de la malkovritaj elementoj, mi plenumigis, en mia imago, la krimon al ĉiuj koncernaj personoj en maniero, ebla al ili. En kelkaj kazoj, tio kondukis al absurdo, en aliaj mi ne trovis motivaĵon, por ĉiuj mankis la pruvo.

Malgraŭe nepris unu fakto: unu el miaj dek tri supozoj estas korekta.

Dum Inspektoro Kant prezentis sian disvolvon, kiu detale kongruis kun mia propra koncepto pri la kazo Steinmann, la foresta, decida pruvo subite defaŭlitis mian kapon. Tial mi sukcesis definitive elekti el miaj dek tri kombinoj la ĝustan, t.e. ke Maxton mem murtis. Inspektoro Kant sutiĉe lumigis la rilatojn Maxton Steinman. En Maxton postrestis profunda vengemo kontraŭ lia malamiko. Kiam, antaŭ kvin da jaroj, Dubois pelis ankaŭ lian filinon al la morto, la milionulo ankoraŭ pli ĉagreniĝis. Ankaŭ de tiam, li pli malsaniĝis kaj mi estas, male al la unua opinio, konvinkita ke li konis sian fariton kaj sciis kio atendas lin: terura suferado, preludo al morto same neeskepebla kiel abomena. Ĉu mi troigas, Profesoro De Groot?»

La maljuna Profesoro konfirmis la

## ANONCETOJ

Ĉiu vorto aŭ mallongigo: 0,75 bfr.  
Enpresigo kostas minimume 15 bfr.  
Unu int. respondokupono valoras 3 bfr.

**ENERGY**, maanblad voor talen en handel (Nederlands, Frans, Engels, Duits en Esperanto). Losse nummers: 10 fr. Abonnement: 100 fr. Flandra Esperanto-Instituut, P. van Humbeekstr. 3, Brussel-W.

Deziras korespondi kaj interŝangi librojn kaj gazetojn esperantajn, ankaŭ poŝtkartojn, kun flandra samideano, Roger Milon, rue Diderot 20, Brive-Corrèze, France, 24-jara urba oficisto.

**Internaciaj FERIAJ Esperanto-kursoj** okazos la 12-15 de oktobro venonta en la Sporta Atlernejo en VEJLE, Danlando. Ĉiuj gesamideanoj estas invitataj. Petu prospekton ĉe Sro L. Friis, Inge-mannsvej 9, Aabyhoj (Denemarken)

**PERLOJN** el prelegoj kaj leteroj de nia Majstro vi trovos en «Pensoj de Zamenhof», kolekto de homaranaj pensoj. Dukolora presio, kvarlingva enhavo prezo: 12 fr. Menu ĉe via libro-servo: Flandra Esperanto-Instituut, P. van Humbeekstr. 3, Brussel W.

**Bulgara Esperanto-p.m.** aperis! Ĝi celebras la 60-jarecon de E, la 30-an datrevenon de la morto de Zamenhof kaj 30-an jubilean Kongreson de Esperanto. Nominala prezo: 20 + 10 levoj. Eldonkvanto limigita. Menu ĝin ĉe F.E.I., P. van Humbeekstr. 3, Brussel (prezo: 7 b. Fr. po ekz.) aŭ ĉe «Internacia Kulturo», str. Alabin, 33, Sofia, Bulgarujo (prezo: 2 int. resp. kup.; aŭfranko rekomenda: 2 pliaj resp. kup.).

**FILATELISTOJ**, la ilustrita katalogo de oficialaj poŝtajoj kun esperanta teksto estas havebla ĉe Flandra Esperanto-Instituut, P. van Humbeekstr. 3, Brussel-W. Prezo: 7,50 bfr.

pravecon de la ŝakmajstro. Gulopez diris plu: «Rezigninte la vivon, Maxton ekpensis pri memmortigo kaj samtempe liaj manovraj vengopanoj konturigis. Li projektis planon tiel demonan kaj subtilan, ke ĝi ŝajnas nekonceptebla. Probable jarojn li prilaboris ĝin, preparis ĝian plej etan detalon. Ĉu Maxton estis normala? Nur psikiatro povus determini tion. Li ĉiukaze posedis intelekton pli ol ordinaran, parigitan kun genia ruzeco kaj karakteria forto, kiu ignoras skrupulojn, kaj la tuto estis incitata de vengobsedo, kies amplekson ni nur povas konjekti. Ni simple pensu pri jena saketo, kiun li preskaŭ ĉiam portis. Mi konvinkiĝis ke ĝi estas ĉifono el lia mallibereja vesto, kaj enhavas peceton da cemento de la karcera muro. Ĉu li ne diris al fraŭlino Durlat: «Kiu portas ion tian, malmolas pli ol ŝtalo?»

Post la morto de sia filino, li logis Dubois. Estigis ŝajna repaciĝo. Fakte nur preteksto, kiu preparis la terenon por la postaj krimoj. Maxton sciis ke Dubois forlasis lian filinon, tuj kiam li laciĝis de ŝi kaj rimarkis ke ŝia patro obstine rifuzas ĉian financan helpon. La milionulo senkompatie restis ĉe sia vidpunkto. Li cetere informiĝis, pere de Sud-Amerika detektiva agentejo, pri la konduto de Dubois. Ke Maxton fakte ne pardonis, rezultas el lia testamento, kie la nomo de Dubois ne estas citita.

Gulopez montris la portreton de Elly. «Ĉi tiu knabino precipe inspiris Maxton kaj impulsis lian vengon. Li cetere mortis kun la vizaĝo direktita al ŝi. Lia sekva paŝo: venigi Steinmann en Eŭropo. Facile, ĉar li havis povon super sia malamiko. Unue li trompe promesis eblan interkonsentan arangon, kiu pli kaj pli prenis la formon de ultimato kaj fariĝis ĉantaĝo. La reto pretis. Maxton eĉ zorgis la partoprenon de sperta spuristo, kiu gvidos la enketon, eĉ pli, li pensis pri atestantoj kaj asistantoj: Profesoro De Groot, Notario Van der Meersch, la geografoj de la Fosse, unuvorte, surŝipe ĉiu gasto senkonscie kunrolis en la dramo.

Kaj tiel ni atingas la vesperon, kiam Maxton drame mortis.»

Nun la atmosfero estis streĉa en la ĉambro.

«Maxton profitis la incidenton de la ebria maristo: neniu povus suspekti la tutan ŝipanaron, kaj tiel li defurnis de ĝi la atenton. Tiam li invitis Steinmann, kiel ĉi tiu konfesis. Laŭ ni, la viro diris la planan veron, sed veron intence tiel neverŝajnan, ke neniu kredis ĝin. Kiam la industriisto atendis en la flanko kontoreto, Maxton memmortigis sin.»

«Sed, tio maleblas!» Kapitano Joost ne povis ne krii.

(Finota)

Verantw. uitgever: Vlaamse Esperantisten-Bond, Postbus 342, Brussel. — Drukkerij: J. Van Laer, Oude Vaartstraat 104, Turnhout.